

AMERICAN ESPERANTIST

Vcl. 53

AMERIKA ESPERANTISTO

E S T A S F O R T O

E S T A S F O R T O

LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKO
Joseph Leahy, General Secretary
Centra Officejo 1410 H Street, N.W. Washington, D.C. Central Office
J.R. Scherer, Pres. Los Angeles, Calif. -- E.G. Dodge, Ch. Exec. Comm. Wash. D.C.

* Number 3 \$1. per year-anywhere 10 cents a copy January 1940 *

REZULTATOJ DE LA NOVEMBRA TRADUKAD-KONKURSO.

En la Novula Sekcio la konkuro estis neniel tiomanombra kiom ni esperis. (La novuloj ŝajnas tro modestaj!) Tamen la unuan premion bone meritis la inda traduko de nova Esperantisto, kiu studis la lingvon nur naŭ monatojn, preskaŭ seninstruiste. Sekvas la listo de premioj.

Novula Sekcio.

1-a, James A. Clarkson, Hopkins, S.C.

Meznovula Sekcio.

1-a, F-ino Roan U. Orloff, Boston, Mass.

2-a, Thomas H. Lord, Universitato de Illinois, Urbana, Ill.

Malnovula Sekcio.

1-a, Harry G. Schatz, Brooklyn, N.Y.

2-a, F-ino Florence Rivere, Brooklyn, N.Y.




Aprobata traduko de la proponita angla teksto troviĝas sube. Tiu estas "mozaiko," konstruita per elekto de la plej frapaj aŭ plej oportunaj esprimoj de du premigajntaj tradukaĵoj, nome, tiuj de S-ro Schatz kaj F-ino Orloff.

"Vi feliĝeguloj kiuj heredos tiun estontan epokon pri kiu ni povas nur revii, -- vi puranimaj kaj brilaj estuloj kiuj postvenos nin sur ĉi tiu tero, -- kiam vi turnos malantaŭen viajn okulojn al ni kompatindaj sovaĝuloj, trafosantaj la grundon por nia pano ĉiutage, manĝantaj karnon kaj sangon, loĝantaj en aĉaj korpoj kiuj malnobligas nin ĉiutage al la nivelo de la bestoj, turmentegataj per doloroj kaj bestaj inklinoj, subigataj de malĝojaj superstiĉoj, nesciantaj la Naturon, kiu tamen tenas nin en siaj katenoj, -- kiam vi legos pri ni en libroj, kiam vi pensos pri tio, kio ni estis, kaj komparos nin kun vi mem: -- memoru, ke al ni vi ŝuldas la fundamenton de via feliĉo kaj grandiozeco, al ni, kiuj nun, en niaj bibliotekoj, kaj sciencaj laborejoj, kaj stelobservaj turoj, kaj sekciad-ĉambroj, kaj fabrikejoj, estas preparantaj la materialon por la homa maturiĝo."

A NEW COMMITTEE OF E.A.N.A. On page 4 of the September issue was printed for reference a complete list of national officers of EANA, and of all national committees in so far as they had then been selected. We are glad now to announce the establishment of a new committee for the important work of promoting the teaching of Esperanto by the direct method devised by Pastro Andreo Cseh. The always active Chairman of the committee is: Miss Roan U. Orloff, (Hotel Gralyn, 20 Charlesgate W., Boston, Mass.) Her two associates on this committee are: Mr. Charles E. Simon, (2651 Idlewood Rd., Cleveland Heights, Ohio,) and: the President of EANA, Mr. Joseph R. Scherer, (new address, 211 1/2 So. Carondelet, Los Angeles, Calif.)

☆☆☆☆☆☆☆☆ F*E*L*I*C*A*N**N*O*V*J*A*R*O*N ☆☆☆☆☆☆☆

New Year Greetings



☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

☆ EVERY PUBLIC LIBRARY SHOULD HAVE
 ☆ THE ADDRESS of the E A N A. Local
 ☆ members should attend to this little
 ☆ matter. FERVORULO A.S. Mellichamp has
 ☆ presented the JARLIBRO to the Public Li-
 ☆ brary of Peoria, Illinois—a splendid ex-
 ☆ ample for others. EVERY ESPERANTIST who
 ☆ cares to be able to answer, intelligently
 ☆ the inquiries of those looking for inform-
 ☆ ation relative to Esperanto, ^{stand have it.} It is really
 ☆ an ENCYCLOPEDIA and DIRECTORY of the activi-
 ☆ ties, Delegates, Papers, societies etc., of
 ☆ the Esperanto Movement—and cost ONLY \$1.00.

80 JAROJ PASIS

(El "Heroldo de Esperanto")

La 15-an de decembro 1859 okazis ke en modesta domo de Bielostoko, ne-granda urbo en la oriento de Eŭropo, ekvidis la lumon de l'mondo unu knabeto, kies genio estis poste brilonta super ĉiuj kontinentoj kaj anguloj de la Tero.

Antaŭ kelkaj jaroj ankoraŭ alvenis al la naskiĝurbo de D-ro L. L. Zamenhof homoj el multaj landoj, por honori lin, por viziti la lokojn kie paŝis liaj piedoj, kaj la domon kie li pasigis siajn infanjarojn. Ne atentis la vizitantoj pri la malĝata pavimo, pri la polvo aŭ koto de la stratoj, nek pri la malriĉeco kaj mizereco de la pli multaj domoj en tiu ĉi urbo: estis tamen la urbo kiu donacis al ni nian majstron!

Kiam Zamenhof naskiĝis, Bielostoko apartenis al la granda rusa regno carista. Post la mondmilito ĝi fariĝis pola, kaj ni konis ĝin prefere sub la nomo Bialystok. Nun denove ĝin prenis Rusujo.

Tiel ŝanĝiĝas la sorto kaj la estroj. Kaj la domo de la majstro estas detruita. Ne pro malbonvolo. Ho ne! Oni ĝin forigis, por ĝialoke konstrui pli modernan domon. Ĝi estis ja nur ligna, kaj kaduka. Kaj por ĝiaj posedantoj ĝi

ne havis tian apartan valoron, kian ĝi prezentis por ni, adeptoj de la majstro, adeptoj de la ideo de lingvo internacia, — valoron pli altan ol nur materia.

Feliĉaj ili, kiuj povis ankoraŭ ĉeesti en Bialystok, viziti la ankoraŭ nedetruitan domon de la majstro, kaj vidalvide kun ĝi revoki al sia imago la tagojn de l'juna Zamenhof, liajn dolorojn kaj liajn revojn, el kiuj fine rezultis tiu grandioza verko kiu jam ampleksas la mondon!

Kaj, kvankam lia domo ruiniĝis, lia naskiĝurbo foje kaj denove ŝanĝis sian posedanton, ankaŭ lin mem jam delonge kovras la tero, kaj liaj parencoj eble vagas ie en mizero, eble ien rifuĝis, de kie ili ankoraŭ ne povis sendi informojn al la esperantistaro, — lia verko vivas, kaj vivados. Ĝin nenio, kaj neniu, povos detrui, kaj nenio kaj neniu povos malhelpi ĝian venkon.

Kaj la 15-a de decembro 1859 restos por ĉiam enskribita en la kultura historio de la homaro, kiel tago granda, memorinda, multsignifa, en kiu naskiĝis unu el la homoj la plej geniaj, la plej bonaj, la plej valoraj: Ludoviko Lazaro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto!

LINGVA STUDIO.-BLEKI.
 Per ĉi tiu ĝenerala vorto ni nomis la parolon (krion de la bestoj).

- la hundo bojas,
- la kato miaŭas,
- la bovo muĝas,
- la ĉevalo henas,
- la porko gruntas,
- la koko kikerikas,
- la kokido pepas,
- la kokino klukas,
- la urso grumblas,
- la lupo hultras,
- la elefanto trumpetas,
- la muso cincas,
- la korvo grakas,
- la abelo zumas,
- la rano kvakas,
- la grilo ĉirpas,
- la turto kveras,
- la kolombo rukalas,
- la cikanio klakas,
- la strigo ululas,
- la pigo babilas,
- la kukolo kukas,
- la mevo krias,
- la vanelo kvikas,
- la serpento siblas,
- la najtingalo kantas.

(El la "Praktiko")

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

REPORT OF THE "LIBROLEGANTOJ"

As announced in a Former Issue, the "Esperanto Rondo de Librolegantoj" having now eight members in the Seven-Star grade, -who have read over 10,000 pages each, out of Esperanto books, has decided to establish an Eight-Star grade, to signalize the reading of over 15,000 pages. One member already has supplied the information which entitles him to this honor. This is Mr. Louis Dormont, Brooklyn, N.Y. (V-Pres., EANA.) who is equally enthusiastic as a teacher and as a student of the language. Are there other Esperantists in our country who have delved into the Esperanto literature in comparable degree? If so, send the list (with numbers of pages) of books you have read (with enclosure of 6c in stamps) to the Director of the Circle: Mrs. Frances L. McDowell,

1416 Allison St., N-W., Washington, D.C.

We are cheered to receive from Mrs. McDowell the following list of added members of the Rondo, in the One-Star, Two-Star and Three-Star grades. Those preceded by the sign "#" were already for some time members duly registered, but have recently added new stars to their membership cards

by further reading of Esperanto.

One-Star Members (100 to 500 pages)

- Mr. A.S. Mellichamp, Peoria, Ill.
Mrs. Ruth B. Robertson, Philadelphia, Pa.

Three-Star Members (1500 to 3000 pages)

- Mr. C.L. Krantz, Madrid, Iowa.
Mr. H.R. Arnold, Sharon, Pa.
Mr. Robert Jones, Dallas, Texas.

Two-Star Members (500 to 1500 pages)

- Mr. John P. Robertson, Philadelphia, Pa.
Dr. Ruth S. Davis, New York.
Mr. Thomas H. Lord, Champaign, Ill.
Mr. William Bailey, Weston, Mass.

*REMEMBER*REMEMBER*REMEMBER*

LIMA, O. 33rd KONGRESO de EANA, LIMA, O. JULY 5,6,7, 1940.

AND WHEN YOU STOP AT THE "ARGONNE", you will be convinced that you do not have to go to the Big Cities to find First-Class Hotel Service. No Forgesa.

DEZIRAS KORESPONDADI-DESIRES CORRESPONDENCE.

- S-ro Algot Nilsson, Amiralsgatan 46c, Malmo, Sweden. In English.
F-ino Ingeborg Larsson, Skolgatan 3b Malmö, Sweden. English, Esperanto & German.
F-ino Hjördis Persson, Döbelnsgatan 1d, Malmö, Sweden. English and Esperanto.
S-ro Sten Bergman, Häkanstorp svägen 50, Malmö, Sweden. Esperanto and English.
S-ro Harry Nilsson, Nobelvägen, Malmö, Sweden. English and Esperanto.

(El la "Franca Esperantisto")

Al la Usonaj Esperantistoj

Laŭ iniciato de S-ro Vincent, al Cherbourg, nia Prezidanto, S-ro Archdeacon sendis la sekvanton leteron al S-ro Scherer, Prezidanto de E. A. N. A., la esperantista asocio de Usono.

La franca landa esperantista Societo sendas al la Usona Esperantista landa Asocio, sian plej koran saluton.

En la terura konflikto, kiu ensangigas Eŭropon, ĝi bezonas senti ĉirkaŭ si la simpation de la neŭtralaj landoj, kiuj scias ke, neniumaniere, Francujo estas responda pri la nunaj okazintaĵoj.


Ni scias ke Prezidanto Roosevelt, interpretanto de la granda amerika popolo, plej ageme penadis por malhelpi al la milito kaj por akceptigi pacajn solvojn. Li ne povis, malfeliĉe, atingi sian celon, sed ni estas profunde dankaj al li, pro tio kion li faris en tiu senco, kaj pro la publika apogo kiun li alportis al la defendo de la liberecoj kaj demokratiaj metodoj.

Ni petas ke vi bonvolu konigi al li nian altan respektan dankon pro lia konstanta agado por la savo de la moralaj principoj sur kiuj estas bazita la vera civilizacio.

Se malbonaj horoj estus okazontaj por Francujo kaj Britujo, ni estas certaj, cetere, ke Usono ne konsentus al la triumfo de la senrajta forto, kiu farus la homan ekziston, ne digna je vivo.

Ni petas vin, estimata Prezidanto, transdoni al la membroj de via asocio, la fidelan senton de ĉiuj francaj esperantistoj.

Subskribis: E. ARCHDEACON.



HOTEL ARGONNE - LIMA, OHIO

★ **Nia devo** ★

Eŭropo denove estas en flamoj. La senhonta sovaĝeco de frenezulo kaj la malnobla « tartufeco » de moskvana novcaro kunigis por dispecigi Polujon, kaj ambaŭ estas metantaj la manon sur la malgrandajn ŝtatojn de Oriento, ĝis nun restintaj sendependaj. Kompatinda spektaklo, kiu igas nin dubi pri ĉiu ebleco plibonigi iam la sorton de la homaro.

Niaj esperantistaj, amikoj scias, ĉiuokaze, en la tuta mondo, ke nia lando meritas nenian riproĉon en tiu katastrofo kie dro-nas ĉiuj moralaj valoroj, kaj ke ĝi iris vere ĝis la ekstrema limo de la pacienco sekve de la apero de Hitler. Ni diru eĉ ke ĝi ĉion toleris ĝis nun: la anekson de Aŭstrujo, tiun de la Sudetoj, tiun de Memel, fine tiun de Ĉeĥoslovakujo, por eviti militon. Sed la mezurilo estis superplena: la invado de Polujo starigis Fran-cujon flanke de Britujo. Ni scias ĉi-tiun fojon ke ambaŭ forlasos sian armilaron nur kiam Eŭropo estos tute liberigita kaj la Hitlerismo neniigita.

Nia internacia esperantista asocio estas do, unu fojon pluan, trafronta gravan krizon; ne moralan, ĉar ĝia spirita unuigo estis perfekta kaj ĝi entenis en siaj vicoj neniun reprezentanton nek de la Hitlerana Germanujo, nek de la nov-carana Rusujo, sed materialan krizon, ĉar ĝia administrato fariĝos tre malfacila kaj la kotizenspezoj de kelkaj landoj ne rapide estos enkasigitaj en Londonon. Niaj francaj membroj tamen povos sen malfacilaĵoj daŭrigi, kiel dum la pasintaĵo, siajn rilatojn kun la internacia oficejo. Nia amiko Goldsmith estas fidela ĉe sia posteno kaj li jam sciigis ke nia jarlibro aperos pli frue ol kutime, tuj de la komenco de l'proksima jaro kaj ke li daŭrigos la rilatojn kun preskaŭ ĉiuj naciaj aliĝantaj asocioj.

Pri S. F. P. E., ĝi same daŭrigos sian vojiradon senhezite. La konstanta oficejo ne jam havos sian sidejon sur strato de « Cha-brol », sed en « Le Mans » kie troviĝas hodiaŭ mobilizita Sinjoro Petit. En tiu urbo, nia nelacigebla konstanta sekretario ricevos la leteraron de la Federacioj. Sinjoro Archdeacon restos en sia kutima loko en Saint-Cloud. Sinjoro Belhoste kaj mi, rekviziciitaj en Paris, ni ankaŭ konservos niajn antaŭmilitajn adresojn.

Estas necese, efektive, ke niaj grupoj multigu sian agemecon dum tiu milito, aŭ por helpi la esperantistojn de l'Oriento pelitaj for de la hejmoj, aŭ por korespondadi kun la aliĝantoj mobilizitaj en la armeoj, kaj alporti al ili la necesan kuragigon materialan kaj moralan; aŭ por konservi la rilatojn kun la samideanoj de la fremdaj landoj, tute egale por la gardado de la interesoj de nia lando, kiel por la savo de la idealo de interpopola frateco kiu estas, pli ol iam, kaj malgraŭ ĉio, la celo de niaj penoj kaj de nia propagando.

Ni insiste petas ĉiujn prezidantojn kaj sekretariojn de niaj grupoj daŭrigi la vivon de la organizaĵoj pri kiuj ili konsentis respondi. Nia movado devas trapasi tra la milito senperda, por ke ĝi povu larĝe disvastiĝi dum la unuaj tagoj de la paco retrovita, en mondo kiu fine komprenos, ni esperas, la maldignegecon de tiuj organizataj mortigoj, kie la homo ne eĉ atingas la moralan nivelon de la besto, kaj utiligas sian mizeran potencon nur por detruo kaj morto.

(Franca Esperantisto)

Jean COUTEAUX.



★ **Nia prezidanto 70-jara**

Kara generalo Bastien, Prezidanto de Internacia Esperanto-Ligo!

La 21-an de decembro 1939 vi festos vian 70-jaran naskotagon.

Estu certa, ke, kiam vi pasos tiun gravan mejloŝtonon de via vivo, la esperantista armeo kaj la batalionoj de pacaj batalantoj en multaj vicoj staros antaŭ vi por vin honori. Kaj vi povas vidi en la okuloj de la esperantistaj soldatoj brilon de admiro, brilon de sindono. Kaj vi povas rimarki, ke viaj kolegoj en la stabo, la Estraro kaj Komitato, kun rimarkebla kortuŝo bondeziras vin.

En malfacilaj tagoj, kiam malhelaj nuboj pendis super nia esperantista movado, vi konsentis fariĝi nia Prezidanto. Kaj ni sentas al vi neesprimeblan dankon pro tiu via preteco servi nian aferon en riskoplena tempo. Ni ĉiuj nun konstatas, ke vi lerte gvidis nin.

Persone mi devas diri, ke mia admiro al vi kreskis de jaro al jaro. Vi pli kaj pli sajnjis al mi modela prezidanto. Ĉar en vi kolektiĝis: saĝo akirita per multjaraj spertoj, neŝancebla bonkoreco, logika penskapablo, persistemo sen obstino, sincereco kaj lojaleco tiel ke vi ĉiam malkaŝe esprimis vian opinion sed ankaŭ lojale kaj demokratece submetiĝis al decido farita de la plimulto.

Ni nun ĝojas, ke via festa tago speciale rajtigas nin esprimi niajn sindonajn sentojn. Ni nur bedaŭras, ke la malpaco en la mondo nebligas al ni realigi la ideon pri donaco, speciala memorigilo, al vi en via honora tago.

Sed, kara Prezidanto, aŭskultu afente la voĉojn, kiuj matene la 21-an de decembro venos tra la etero el ĉiuj partoj de la mondo, vin honori, vin gratuli!

Vi aŭdos:

Vivu generalo Bastien!

Longe vivu nia kara Prezidanto!

("Her.de Esp") E. MALMGREN.

Postrimarko de la Redakcio: Aldone ni informu ke nia Prezidanto de kelkaj monatoj suferas je malsano eble malpli grava ol suferiga. Kvankam s-ro gen. Bastien al ni skribis ke «tiu malsano tute ne interesas nian movadon», aldonante ke li nur skribis por sciigi pri adresŝanĝo, tamen ni ĉiuj, la tuta esperantistaro, deziras al li baldaŭan resaniĝon, por ke li povu festi sian 70-an naskiĝotagon en plena saneco kaj plej bona humoro.

Tute silente preterpasis alia jubileo: Ankaŭ nia Generala Sekretario (de IEL), s-ro Cecil C. Goldsmith, havis en ĉi tiuj semajnoj gravan feston: la 16-an de novembro li fariĝis precize 50-jara. Ne necesas insisti ĉi tie pri la grandaj meritoj kiujn li akiris al si dum multjara senlaca laborado por nia afero.

Fine ni malkaŝu ke ankaŭ la Vicprezidanto de IEL kaj gvidanto de ĝia Filia Oficejo en Stokholmo, s-ro Ernfriid Malmgren, fariĝis la 3-an de novembro 40-jara.

Ankaŭ al s-roj Goldsmith kaj Malmgren post-feste do plej korajn gratulojn!

Ĉiuj Esperantistoj tute tra la mondo kniĝas en la gratuloj-E A N A Estraro.



La plej stulta argumento

De kelkaj monatoj, italoj « ĝuas » legajon, kiun antaŭ iom da jaroj sufiĉe ofte havis la plezuron ĝui germanoj; oni atakas nian aferon el la vidpunkto de konfeso aŭ de rasismo, argumentante ke Esperanto estas « lingvo hebrea », pro la fakto ke estis hebrea kiu ĝin kunmetis! Jen argumento la plej stulta kaj mizera kiu povas esti jetata kontraŭ nia afero, kaj kontraŭ nia lingvo kiel ties ilo.

Cu aŭtomobilo, aŭ ŝipo, aŭ maŝino povas esti kristana, mahometana, hebrea, pro tio ke estis kristano, mahometano aŭ hebrea kiu ĝin elpensis? aŭ, kiam oni volas paroli pri raso: ĉu aŭtomobilo, aŭ ŝipo, aŭ maŝino, aŭ radio-aparato, aŭ alia instrumento aŭ elpensajo destinitaj por ĝenerala uzado, povas esti arja, juda, aŭ mongola, pro tio ke estis italo, aŭ judo, aŭ japano kiu desegnis ĝian planon aŭ helpis pri ĝia konstruo aŭ efektiviĝo?

Se al Esperanto oni volus atribui ian rasan karakterecon, oni povus eventuale diri ke ĝi estas « arja », ĉar ĝia hebrea aŭ turo kompilis ĝin el konsistaĵoj de tiuj naciaj lingvoj kiuj estas parolataj de precipe arjaj popoloj, — kaj estis minimume 80% arjarasanoj, kaj maksimume 5% hebrea-rasanoj, kiuj dum duona jarcento uzis siajn plej bonajn lingvospertojn por poluri kaj pliperfektigi ĝin.

Sed estas preferinde lasi la internacian lingvon ekster la rasa teritorio. Ĝi estas nek arja, nek hebrea, nek negra, nek mongola, sed — internacia, en la plej bona senco de tiu vorto. Same kiel aŭtomobilon konstruitan en Usono, ekzemple de la Ford-uzinoj, oni povas uzi sur sveda aŭ hispana, kiel sur nordafrika aŭ aŭstralia

soseo, same kiel radio-aparaton fabrikitan en Germanujo, ekzemple de « Telefunken », oni povas funkciigi ĉe la Rejno tiel bone kiel ĉe la Nilo aŭ Nigero, en la siberiaj stepoj kiel en la dezerto Saharo, kaj povas ĝin uzi homoj de ĉiuj gentoj, de ĉiuj rasoj kaj popoloj; same bone Esperanto povas esti uzata ĉie, kaj de ĉiu, — la sola diferenco estas ke ĝia uzado postulas iom pli ol nur mekanikan scion. Se, por funkciigi la internacian interkomprenigon, oni bezonus nur fari kelkajn mekanikajn manipulojn, delonge tia Esperanto-maŝino estus ĝenerale enkondukita, egale, ĉu ĝin eltrovis hebrea, aŭ arjo, aŭ japano, aŭ zuluo, aŭ alirasulo, kaj ĝiaj fabrikistoj farus bonan negocon, eĉ se ili vendus ĝin multekoste, — kaj neniu rasfanatikulo sonĝus pri tio, ataki Esperanton el la vidpunkto de rasismo, se ĝi estus nura mekanika ilo, funkciigebla per premo de butono, per streĉado de risorto, aŭ per turnado de kelkaj radoj.

Malfeliĉe (aŭ feliĉe?), por funkciigi la « interkomprenigan maŝinon », oni devas iom lerni, iom pensi, — sed tion multaj homoj ne ŝatas, kaj tial ili ne aĉetas ĝin, kvankam ĝi estas tre malkara, kaj ne malofte eĉ senmone, akirebla. Kaj la fanatikaj kontraŭuloj plu jetas kontraŭ ĝi sian koton. Ankoraŭ! Sed ne plu longe.

Esperanto, ĝi mem nek katolika, protestanta, aŭ hebrea, nek arja, negra aŭ malaja, estas kunmetita de judo. Ni ne timu tion konfesi. Spite de tio ĝi estas mirinda instrumento por efektiviĝi nian ideon kiu — la ideo de lingvo internacia, la ideo de tuthomara interkompreniĝo — siavice ankaŭ estas nek speciale kristana, nek budhana, nek juda, nek negra, nek mongola, sed — de jarmiloj! — la revo kaj espero de milionoj da homoj ĉiureligiaj, ĉiukoloraj, ĉiurasaj. Estas ĝuste por tio ke ni batalas, por ke « la bela sonĝo de l'homaro por eterna ben' efektiviĝos ».

La koto de l' kontraŭuloj ne atingas nin. Ĝi defalas de nia pura ŝildo, aŭ resaltas al ili, malpurigante ilin mem.

La stultaj argumentoj ne efikos. Estonteco ĝin pruvos.

RED BANK, NEW JERSEY IS GETTING ON THE ESPERANTO MAP in a BIG WAY, with CHARLIE HORNIG teaching big classes of enthusiastic students.

MRS. DELLA C. QUINLAN a hard worker in Esperanto in the N.Y. Metropolitan District, for years, did great missionary work in Red Bank to get the folks Esperanto-conscious, and then found the right man to teach la kara lingvo.

TEAM WORK COUNTS.

★ **FROM OKLAHOMA CITY.** Mr. Sellers N. Bunoh, Pres., Esperanto Society of O.C. writes: " We all enjoyed very much the Cseh-Course of Instruction conducted by Miss Orloff. She is an excellent instructor and a fervent Esperantist. During her stay here she brought Esperanto to the attention of thousands of people who had never heard of it before.

She made about 10 appearances at meetings other than her Esperanto classes. She made one radio talk and one interview with the "Oklahoman" reporter. Oklahoma City is now Esperanto conscious. As a result of this course we believe we shall have 3 additional classes in our Junior High Schools this next semester, which starts about February first. A Group of Okla. City Esperantists drove to Kingfisher, to assist in organizing a study group there, with Mr. W.L. Person (an old Esperantist) as leader. ★

Parolas la majstro

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj.

(Parolado Guildhall 1907.)

CORRESPONDENT'S ADDRESSES. It would require the service of a special clerk to reply to many inquiries for "names of people in other lands to whom I can write"-writer usually names from 5 to 20 countries he would like to hear from.-A stamp has been known to accompany an occasional request (A RARITY). To all who would like lists of correspondents, we refer you to the pages of the Foreign papers named on page 7. They carry little announcements of from 1/2 dozen to several dozen in each issue. Small adv., in "Amerika Esperantisto" for 25 words 25 cents-and this paper goes into nearly a dozen foreign lands.

 SE VIA MEMBROKOTIZO DEVAS ESTI PAGATA NUN AU BALDAU
 VI TROVAS KOLORAN KRUCON APUD VIA NOMO SUR LA KOVERTO !!!!!

Kunuzado de Esperanto jam kutima

oni konstatis ĉe komercista kongreso en Kopenhago.

Dana samideano sendis al ni la jenan tradukon el « Dansk Esperanto-Blad »:

Ni esperantistoj ordinare estas modestaj, kompare kun la signifo de nia movado. Ni havas la inklinon rigardi la uzadon de Esperanto kiel privatan aferon inter esperantistoj, — aferon kiu nur koncernas tiujn kiuj deziras ion oferi al la idealoj, kaj kiel aferon kiu ne estas estimata de homoj vivantaj sur la fundo de l' realeco.

Ni certe atingus pli ĝustan rekonon, se ni revizius tiun ĉi opinionon.

Pruvon por tio prezentas la fakto ke multaj el la partoprenintoj de la internacia komercista kongreso (kongreso de komercaj ĉambroj), kiu okazis antaŭ nelonge en Kopenhago, sin turnis al la komitato kun la demando, ĉu Esperanto estas parolata. Evidente oni jam kutimigis al tio ke, kie multaj lingvoj estas parolataj, tie ankaŭ la helplingvo Esperanto devas esti uzata.

Se iun fakon oni devas konsideri kiel havantan speciale grandan rilaton kun la realeco, tio certe estas la komercista fako. Se ĉi tiu fako interesigas pri Esperanto (kaj evidente ĝin bezonas), tiam oni ja povas konjekti ke la lingvo trovis aprobon en la mondo de l' realeco.

Tial: forigu ĉiujn « malplivalor-kompleksojn »! Ne preterlasu iun okazon por disponigi nian lingvon al tiuj kiuj povas vzi ĝin en la praktika vivo!

Her.de Esp

By paying your dues so promptly that the committee-and the SEK-will never need to worry about you. You can be of great assistance to the movement by interesting a friend-or several-to become members.

UNUECO ESTAS PORTO

ANY ESPERANTIST IS PERMITTED to teach a group of BEGINNERS. It is hoped, however, that he will announce his group to the EANA Office, with name and address of each pupil, method, and textbook used, time and place of meeting. After completing the teaching of his first group, it is hoped the instructor will apply for his own certificate. Only those who have acquired a teacher's certificate should try to teach ADVANCED students. Write Professor Edwin L. Clarke, Box 14, Rollins College, Winter Park, Florida. (Chairman of Exam. Comm.) He will send application blanks. N O W.

ESPERANTO STUDY CLUB of Kingfisher, Oklahoma, meets in the High School, Monday evenings at 7.30, with W.L. Person leading. The club started with 25 members.

SE VIA MEMBROKOTIZO DEVAS ESTI PAGATA NUN AŬ BALDAŬ

VI TROVAS KOLORAN KRUCON APUD VIA NOMO SUR LA KOVERTO

Kuracisto: "Vi devas ĉiutage tri horojn promeni! Paciento: "Ĉu mi devos tion antaŭ aŭ post miaj deĵor-iradoj? Mi nome estas leterportisto"



B*O*Y***S*C*O*U*T*S- and others! attention. A little notice in Dec. issue of "Boy's Life" brought many inquiries for information. Scout Director-George Falgier Winchester, Ill., will take care of them-after we send them "a few lines" Falgier's lessons are splendid examples of EFFICIENCY and SIMPLICITY at cost of only 3c per. Send for No.1-you will be surprised and delighted.

"WHEN WILL THAT FILM BE SHOWN IN OUR TOWN?" This is a frequent inquiry. All we can do is announce when a film is in production, Only the producer can tell-and he, only approximately-when it will be shown. There are now 3 in production-1 in America and 2 in Europe.

EANA, LIMA, O. JULY 5, 6, 7.

ĈU NI PENSAS EN LINGVO ?

En Heroldo n-ro 25 (1030) R. v. L. petas fakpsikologon respondi ĉi tiun demandon. Mi ne estas fakpsikologo, sed estante zoologiisto, mi bone konas la anatomion kaj fiziologion, kiuj ankaŭ povas iom klarigi tion ĉi, mi pensas. Ekhavante ideon, oni ne pensas per vortoj, ĝi estas subite en la kapo; sed poste pripensante ĝin, oni efektive pli malpli konscie pensas per vortoj. En tiu okazo la parolorganoj faras malfortajn movojn de parolo, kaj jam oni devas diri ke oni pensas en lingvo. Tiel mi ofte konstatis ke oni pensas en Esperanto.

En la lernejo mia instruistino pri germana lingvo iam diris: « Oni scipovas lingvon, kiam oni kapablas sonĝi en ĝi. » Mi kredas ke ankaŭ la sonĝado estas speco de pensado. Mi fakte kelkfoje sonĝis en Esperanto (sed neniam en alia lingvo krom mia gepatra!), kaj certe ankaŭ multaj aliaj gesamideanoj tion spertis. — Resume mi do opinias ke oni vere, almenaŭ plej ofte — pensas en lingvo!

"Her.de Esp." C. STOP-BOWITZ.

ESPERANTO by CORRESPONDENCE BEGINNERS and ADVANCED Instructor licensed by EANA as Teacher. Address: "ESPERANTO-BY-MAIL" ST. ALBANS, NEW YORK.

A PICTURE IS WORTH 1000 WORDS Postage Stamp Photographs Perforated and Gummed Ready to Stick to Anything

They are Individual UNIQUE and Hold Attention A Photograph Attached to a Letter Gives it Personality For Letters, Greeting Cards—Birthday, Christmas, Weddings, Baby, Mother, Father—Their uses are unlimited. You can use them to advantage in many ways—Business, Social, etc. 100—\$1. 500—\$4. 1000—\$7.

The 'GEM'—If You Want A Larger Photograph Size, 1 3/4 x 2 3/4 25 for \$1.00, or 50 for \$1.50 Send Photo, or Picture (any size) Original returned unharmed

LEAHY PHOTO SERVICE 1410 H STREET, N.W. WASHINGTON, D. C. U R no farther from us than your Nearest Mailbox

COPYING, ENLARGING, COLORING, SCENICS "Ĉu mi devos tion antaŭ aŭ post ("Heroldo de Esperanto")

TEXTBOOKS, SONG and MUSIC BOOKS and PERIODICALS.

PRACTICAL GRAMMAR of ESPERANTO, by Dr. Ivy Kellerman-Reed. 4th Edition-1938-144 pages of grammatical explanations, dialogs and full exercises, both into and from Esperanto For Beginners and Advanced students. Suitable for class or self-instruction.....60c

ESPERANTO HOME STUDENT, BY James Robbie. 10th edition-1938-27 lessons with keys to each Grammar, Pronunciation and word formation clearly explained. Class or Self-study...20c

FUN WITH ESPERANTO, by Prof. C.C.Bristor.Vocabulary consisting of words you wish to use. Time saving devices. Everyday conversations. Interest holding.....85c

EASY COURSE in ESPERANTO, by Carl Froding. The adjective tells the story.....10c

GRAMMAR and COMMENTARY, by Gen.Cox. An authority all over the world with Esperantists for many years. Hundreds of explanatory words and phrases..... \$1.00

STEP by STEP in ESPERANTO, by M.C.Butler. A universal favorite for many years. For Beginners or Advanced students..... 75c

AMERICAN POCKET DICTIONARY,by Carl Froding. 80 pages of English-Esperanto and Esperanto-English, with essentials of grammar and word formation. Whole words listed, instead of root only, as in so many others. Worth much more but sells for only.....25c

EDINBURGH DICTIONARY. English-Esperanto and Esperanto-English. Pocket size. 288 pages. Ideal for all Esperantists. Eventually you must have it-why not now?.....75c

MILLIDGE'S ESPERANTO-ENGLISH Dictionary. Indispensible to all. Has no equal.....\$2.50

ENGLISH-ESPERANTO KEYS. Vest pocket size. Always a handy companion.....5c

THE HOLY BIBLE. In Esperanto. \$1.75

KONCERTA KANTARO.Song book,with music of the most famous artists and composers:Haydn, Schubert, Comelius, Schuman, Berat, Mendelssohn, Beethoven, Mozart, etc.Cloth \$1.50 Paper covers \$1.00. Sheets 8X11.

HIMNARO ESPERANTA. 200 Familiar Hymns in Esperanto. 60c.

KANTARO ESPERANTA. 350 songs with familiar airs.....50c

DISERVO ĉe LA TRIDEKTRIA KONGRESO. One of the finest sermons. Too good to miss. consists of 3 sheets, stapled.One for 7c, 5 for 25c.

PERIODICALS in Esperanto and English.

"Be in the Know" of Foreign affairs pertaining to Esperanto, by subscribing for some of the Esperanto papers-here are some of the best:

BRITISH ESPERANTIST.Esperanto and English, Monthly-since 1904-a world favorite.Year, 75c

LA PRAKTIKO. All Esperanto. Illustrated. Instructive. Entertaining. Monthly. " \$1.40

HEROLDO de ESPERANTO. " .Twice a Month.Official organ IEL. \$2.00

ESPERANTO INTERNACIA. " .Monthly. Official organ of IEL. \$1.25

SCIENCA GAZETO. pertaining to scientific subjects-this is an all-American paper..\$1.00

SMALL ANNOUNCEMENTS of people wishing to correspond with others in all parts of the world are carried in these periodicals-from a half dozen to a hundred or more sometimes.

YOUR MEMBERSHIP in the E A N A WILL BE APPRECIATED.

The E A N A sends the monthly AMERIKA ESPERANTISTO to each member-and several copies to Foreign Exchanges and many Libraries. It answers numbers of inquiries from those wishing to know more about Esperanto activities. It appoints and directs several committees, established for promoting the Esperanto cause in various ways. It sells Esperanto Textbooks and other publications. It holds annual congresses, which promotes acquaintance among Esperantists and awakens new enthusiasm.

BY YOUR MEMBERSHIP AND PAYMENT OF DUES, YOU HAVE THE PRIVILEGE

IN AIDING IN ALL THIS WORK ON BEHALF OF A HIGH IDEAL MEMBERSHIP RATES-Fixed at 1939 Congress.

With "Amerika Esperantisto" \$2.00 and , if you wish membership in the International Esperanto League (IEL) also, you can save money by our COMBINATION reduced rates: EANA-IEL membership, with Amerika Esperantisto, and the Jarlibro(Yearbook)-an encyclopedia of Esperanto information, for \$2.75-instead of \$3. All the above and the "Esperanto Internacia(monthly official organ of IEL) for \$3.75-instead of \$4. Or membership in both organizations, with Jarlibro, Amerika Esperantisto and the Twice a Month official organ of IEL "Heroldo de Esperanto" for only \$4.25.

EVERY MEMBER SHOULD BRING IN A NEW MEMBER FOR E A N A AND I E L-this means you also. ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA, 1410 H Street, N-W. WASHINGTON, D.C.

SE VIA MEMBROKOTIZO DEVAS ESTI PAGATA NUN AŬ BALDAŬ VI

TROVAS KOLORAN KRUCON APUD VIA NOMO SUR LA KOVERTO!!!*
